*1999* *1*

# *KOMENCANTO*

*gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj*



*Oksana Burkina,*
[SIBIRSKIJ, Altajskij kr. RUSIO]

redakcie — esperanto kaj turismo — gramatiko kaj tempo
strangaj metodoj — limerike — rondo-kato — aforismoj
korespondu! — abonu KOMENCANTON!

# KOMENCANTO

**1999 numero 1/ refondita en 1997/ 8 numeroj jare**
**redaktas kaj eldonas:** Viktor Kudrjavcev
**konstanta kunlaboranto:** Rafija Jafasova
**adreso:**
620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando
**elektronika poŝto :** let@post.e-burg.su
**abontarifo** por 1999:
*internacia tarifo:*
24 nederlandaj guldenoj aŭ $12; *orienteŭropa kaj latinamerika tarifo:* $10; aŭ por ĉiuj — 15 IRK
**konto ĉe UEA:** vkud-a
*ruslanda tarifo:* 54 рубля
(за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132


# PERANTOJ

## de KOMENCANTO

*laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton*

AŬSTRALIO
Libroservo de AEA, P.O.Box 230 Matraville N.S.W. 2036.
ĈEĤIO
Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice
ESTONIO
Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn
ITALIO
Višnja Brankovič, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste
POLLANDO
Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskego 77-137, PL-01-865 Warszawa
SVEDIO
SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby
SVISLANDO
Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen
UKRAINIO
Dmitrij Cibulevskij, ab.skr. 9307, UA — 310003, Ĥarkiv

ĈINIO — vakas
BRAZILO — vakas
BRITIO — vakas
FRANCIO — vakas
JAPANIO — vakas
NEDERLANDO — vakas
USONO — vakas

# redakcie

Karaj legantoj!

Vi tenas en la manoj la 1-an numeron de 1999.

Kiel vi povas rimarki, ni alilokigis la redakcian mesaĝon de la unua paĝo sur la duan. La kovrilo — nur por desegnaĵoj.

Vi vidas la katon — desegnaĵo de *Burkina Oksana* el la urbeto SIBIRSKIJ, de Altajskaja gubernio. La kato aperis tute ne ŝajne. Unue — venas al ni la kat-jaro. Due — ni konatigas vin kun la organizaĵo de Kat-Amantoj. Materialon legu sur la paĝo 6. Se la redakcio ricevos reehojn pri la kata temo, tiam ni rakontos pri la agado de KAT-Amikaro pli detale.

Ni restigas por la Ĉefa Temo la 3-an paĝon kaj plenumas nian promeson kaj komencas rakonti pri "Esperanto kaj Turismo" per la ĝenerala superrigardo al la temo.

Ni demandis nian legantaron fine de la 1998: "Ĉu la GRAMATIKA PAĜO estas bezonata?" kaj ricevis 100% "jesan" respondon. Tial ni startas per la temo bezonata al ĉiuj — TEMPO. Ĉi-tie ni rakontas pri HOROJ, en la sekva numero — pri tagoj, ties partoj, semajnoj, monatoj, jaroj...

Sur la 5-a paĝo vi trovos tute brilan teatraĵeton de *Jean Andre METZELER*, el urbeto CEBAZAT, Francio pri la (ve!) ofte aktuala temo.

Sur la sesa paĝo tradicias *Bill Thorne*, [LONDONO, Britio].

Sur la sepa — kelkaj anekdotoj kaj aforismoj. Ne mankas ĉi-numere desegnaĵoj.

La paĝo KORESPONDU! restis preskaŭ sen ŝanĝoj.

Fine ni invitas ĉiujn, kiuj ne ankoraŭ abonis KOMENCANTON 1999 fari tion. Vi ricevos plezuron multe pli grandan, ol tiuj sumoj de rubloj aŭ guldenoj, kiujn kostas la abono!

**Via abono**
**por via kaj nia bono!**
**KOMENCANTO '99**

KOMENCANTO-2'99 — redaktofino la 1-an de marto

# ESPERANTO kaj TURISMO

Karaj amikoj!

Ni komencas rakonti pri eble la plej interesa apliko de la internacia lingvo Esperanto - vojaĝoj.
Oni povas diri, ke vojaĝi eblas sen Esperanto. Tio veras. Sed per Esperanto vojaĝoj iĝas multe pli allogaj, fruktodonaj, impresplenaj kaj memorindaj. Ĉar tiujn vojaĝojn akompanas nekomparebla atmosfero de amikeco kaj la plej valora lukso en la mondo — renkontiĝoj kun homoj anime kaj idee proksimaj.Ĉi-sube ni prezentas la ĉefajn specojn de la vojaĝoj, kiujn eblas fari dank'al Esperanto:



RENKONTOJ EN LA LANDO.

Ekde la unuaj jaroj esperantistoj kolektiĝis en kluboj, ligoj, asocioj surloke, en urboj, urbetoj, distriktoj. Post la uzado letera nature bezonatis uzo parola. Kaj oni komencis organizi renkontiĝojn distriktajn kaj regionajn. Ekde tiam aperis nekomparebla etoso inter homoj, ligitaj per la "interna ideo". Programoj de tiuj renkontiĝoj estis plejparte distraj kaj amuzaj. Lokaj organizantoj montris al la gastoj vidindaĵojn de sia urbo, oni promenis amike parolante. Tial rememoroj kaj impresoj pri la renkontiĝoj ĉiam restis pozitivaj. La vican renkontiĝon oni organizis jam en alia loko. Tiel aperis la esperantistaj vojaĝoj.

KONGRESOJ

Internaciaj kongresoj de esperantistoj estas organizataj ĉiam en diversaj landoj por montri veran internaciecon de Esperanto kaj doni al la homoj eblecon vidi tiujn landojn.

Kutime la kongresoj daŭras unu semajnon kaj enhavas grandan turisman programon, oni povas mendi plaĉajn ekskursojn eĉ je kelkaj monatoj antaŭe. Ofte la vojaĝo al la kongresurbo mem estas ekskurso. Sufiĉas rigardi la liston de la kongreslandoj, kiun oni publikigas en la Jarlibro de UEA por vidi, ke dank'al Esperanto oni povas viziti ĉiujn kontinentojn . Dum la lastaj jaroj: Usono, Islando, Brazilo, Kanado, Ĉinio, Britio, Kubo, Norvegio, Aŭstrio, Hispanio, Koreio, Finnlando, Ĉeĥio, Aŭstralio, Francio, Germanio, Israelo. Oni speciale por turismaj kaj ripozceloj organizas "antaŭkongresojn", "postkongresojn", kiam la partoprenantoj utiligas siajn feriojn por pli multon vidi kaj plezure ripozi.



VIZITOJ al AMIKOJ

Diverslandaj amikoj kutime konatiĝas perletere aŭ dum kongresoj, interkonsentas pri la renkontiĝoj kaj poste vizitas unu la alian por reciproka plezuro. Ne malpli agrablaj kontaktoj stariĝas ene de la landoj. Interesa estas fenomeno — homo, kiu akceptas la gaston preparas por tiu programon, kiu celas viziti la urbajn vidindaĵojn, muzeojn, galeriojn ktp. Kaj li mem ĉiĉerone vizitas ilin dank'al la gasto, ĉar aliokaze homoj ne vizitas vidindaĵojn en sia propra urbo, ili "ne havas tempon"! (Tiajn okazaĵojn mi spertis en Londono, en Parizo, en Stokholmo...*VK*)

Ofte el la personaj kontaktoj aperas familiaj paroj. Ekzemple, en Ekaterinburg loĝas 5 familiaj paroj, kiuj konatiĝis dum la renkontiĝoj.



PASPORTA SERVO

Ĉar la amikaj vizitoj kaj kontaktoj ekhavis amasan karakteron kaj la esperantistoj montris sian emon al kontaktoj kun homoj el aliaj landoj, jam delonge ŝvebis en la aero ideo organizi reton de tiuj dezirantoj akcepti gastojn ĉe si hejme tute libervole kaj senpage, nur pro tio, ke tiu vizitanto estas esperantisto. La ideon efektiviĝis dank'al Tutmonda Esperantista Junulara Organizo - TEJO. La unua listo havis nur kelkdek adresojn de gastigantoj, la lasta de 1998 jaro jam -ĉirkaŭ unu mil el 70 landoj. La sukceso de Pasporta Servo estis tiom granda, ke la listo de la akceptantoj ŝanĝiĝas, sed ne malgrandiĝas. Ni detale rakontos pri la PS.

MONDA TURISMO

Certe ne povis ne rimarki bonegajn turismajn eblecojn de Esperanto entreprenemaj homoj, kiuj okupiĝas pri turismo profesie. Estis en 1970 jaro fondita organizo MONDA TURISMO, kiu en 1992 aliĝis al UEA kaj hodiaŭ estas la plej grava asocio de diverslandaj vojaĝoficejoj, kies celoj estas: *faciligi turismon per Esperanto. Faciligi al esperantistoj vojaĝi. Organizi aŭ partopreni amasturismon por pruvi valoron de esperanto.*

Pri MT ni ankaŭ detale rakontos en ĉi-jare.

Ni petas vin, karaj legantoj de KOMENCANTO sendi al ni rakontojn pri viaj personaj okazaĵoj, kiujn vi spertis dum vojaĝoj per

# GRAMATIKO kaj TEMPO

*TEMPO - universala kategorio de la homa spirito, en kiu ĝi ordigas la sinsekvajn fenomenojn, kaj kiu estas konceptata kiel senfine granda kaj senfine dividata* (PIV)



Sed hodiaŭ ni traktos la tempon ne kiel filozofian koncepton, sed kiel ĉies ĉiutagan bezonaĵon en ĝiaj konkretaj elementoj, kiuj estas necesaj al ni ĉiupaŝe. Ni pensas, ke tio estas certe necesa por komencantoj, kiuj volas kaj provas flue paroli en Esperanto. Por trejnado de flua parolo estas bezonataj "parolstampoj", kiujn eblas eldiri rapide, facile, ne enpensiĝante kaj ne konstruante en la menso necesajn frazojn.

Ĉi-sube ni provas faciligi tiun taskon kaj komencas nian rakonton de la plej malgrandaj tempopartoj.

SEKUNDO — sesdekono de minuto
MINUTO — sesdekono de la horo
HORO — la 24-ona parto de la TAGO:

### Tipaj frazoj kun la vorto HORO

*horloĝo, kiu sonas la horojn kaj duonhorojn; diurno enhavas 24 horojn; astronomia, norma horo; preni kuracilon je ĉiu horo; ŝveli kun ĉiu horo; li staris tutan horon.*

*kioma horo estas?, estas la tria, dek minutoj post la tria, la tria kaj duono, dek minutoj antaŭ la kvara (horo); demandi pri la horo; rigardi la horon sur sia poŝhorloĝo; li havas ĉiam la ĝustan horon; fermite inter la 12a kaj la 14a (horo); oni donas por manĝi je ĉiu horo; la horo de Grenviĉo, de Centra Eŭropo; la somera, la vintra horo; kvinahora tetrinkado;*

*por ĉiu faro estas horo, vi venas en bona horo. mia horo ankoraŭ ne venis, en 'la horo de la venko, en la lasta horo de mia vivo, lia horo ekbatis.*

*en malfacila horo eĉ groŝ' estas valoro, li ĝuis horojn de gloro;*

(PIV)

---

**HORARO**: Regula antaŭdifinita aranĝo de la horoj, en kiuj devas okazi servoj, kursoj, naturaj fenomenoj ktp.: *horaro de fervojo, de lernejo; malfruiĝi je la horaro.*


Tabelo de tiu aranĝo: *aĉeti fervojan horaron*

Okazanta, alvenanta en la lasta horo, antaŭ iu tempolimo: *lasthora kompromiso, lasthoraj novaĵoj.* (PIV)


# Kioma horo estas?

Tempon dum TAGO oni mezuras per *horloĝo*. Horloĝo estas aparato por mezuri la tempon kaj montri la horojn.


Por indiki la tempon per horloĝo oni nepre uzas la ordajn numeralojn.antaŭ la horoj kaj la artikolon "la"



estas
La tria kaj kvardek minutoj
Dudek minutoj antaŭ la kvara
Kvardek minutoj post la tria



estas
La unua kaj dek kvin minutoj
La unua kaj kvarono
Kvarono post la unua
Tri kvaronoj antaŭ la dua



estas
La deka kaj tridek minutoj
La deka kaj duono
Duono post la deka
Duono antaŭ la dek unua

# LIMERIKE

Venu al nian kongreson!
Donu al ĉiuj vian adreson.
Leteroj abundos
Poŝtkartoj inundos,
Finfine vi havos eksceson.

***




BILL THORNE [LONDONO, Britio]

---

RONDO Kato
ESPERANTISTA KAT-AMIKARO

# RONDO~KATO

*Malgraŭ tio, ke nia ĉeftemo ĉi-jare estas "Esperanto kaj turismo" ni daŭrigas rakonti pri aliaj interesaj aplikoj de la internacia lingvo kaj kelkvorte prezentas la organizaĵon de kat-amantoj*

En KOMENCANTO-8'98 aperis poemetoj de Santi Elena Bullo el Italio "Ameme" kaj "Apud la telefono", kie estis karesaj esprimoj pri katoj. Kiel ni scias, s-ino Bullo estas ano de la "Rondo-Kato" (Esperantista Kat-amikaro), ŝiaj varmaj vortoj pri la katoj instigis nin informi la legantaron de KOMENCANTO pri ekzisto de tiu fenomeno en la esperantista mondo.

"Rondo-Kato" estas internacia organizaĵo de kat-amantoj [poŝta adreso: Ingrid Nasholm, Linderbergsg. 4, SE-85356 Sundsvall, Svedio].

Organo: "Folioj de Kat-amikaro" (4 numeroj jare). Membroj en 24 landoj. Interŝanĝas kaj vendas diversajn poŝtmarkojn kaj bildkartojn kat-temaj kaj helpas diversmaniere laŭteme.

Prezidanto d-rino Marjorie Boulton, [36 Stockmore Street, Oxford, Britio OX 1 JT] pri kiu "La Brita Esperantisto" (jul-aŭg 1998) skribis, ke ŝi "sendube estas la plej adorata kaj karismata publika personeco en Esperantujo" En la 82 Brita Kongreso "ŝi triumfis per prelego titolita "Ĉeŝiraj katoj kaj folklora zoologio" plena de faktoj kaj fantazio, amuzo kaj instruo. La prelegon ŝi finis per la aktorita de ŝi rideto de la malaperinta Ĉeŝira kato. Kiu alia krom ŝi povus aktori katan rideton ŝvebantan en aero?"




BILL THORNE [LONDONO, Britio]

Ni supozas, ke multaj el vi, karaj legantoj, havas katojn en viaj hejmoj, tre amas ilin kaj ricevas multajn pozitivajn emociojn de viaj *lanugaj* amikoj.

KOMENCANTO pasintjare kelkfoje donis siajn paĝojn al la "kata" temo ("La tria kato" [4'98] "Kial katoj lavas sin post manĝo?", "La danka kato" [5'98] ) kaj ni plezure publikigos rakontojn pri interesaj okazaĵoj, kiuj eble okazis kun vi lige kun la katoj.

*Jan Andre METZELER* [urbeto CEBAZAT, Francio]

# STRANGAJ METODOJ

**(la dentisto legas ĵurnalon. Eniras la kliento, kiu similas al paska ovo, pro dika bandaĵo sur vango. Li pasas antaŭ la dentisto, ne atentante pri li. Subite, la dentisto pafas per pistolo. La kliento, terurigita, levas la brakojn.)**

La dentisto — Turniĝu! Mallevu la brakojn! .. Ĉu vi fartas pli bone?

La kliento — Jes...si...si...sinjoro. Sed vi multe ti... ti... timigis min!

D — Estas mia metodo!

K — Stranga metodo!

D — Eble... sed efika! Vi tiom timis, ke vi ne plu sentas doloron... ĉu ne estas vere?

K — Jes... estas vere... tamen, mi preferas la kutimajn metodojn.

D — Vi malpravas, sinjoro. Mi estas certa, ke vi ŝatos miajn procedojn, kiam vi konos ilin.

K — Tio mirigus min.

D — Unue, ni vidu tiun denton... Sidiĝu!... Malfermu la buŝon...Jes, mi vidas... Mi tuj eltiros tiun aĉaĵon!

D — Vi pravas. Ĝi ne plu estas laŭ la modo... Kion vi diros pri eksplodaĵo?

K — Eksplodaĵo! Vi estas freneza!!! Vi volas murdi min?

D — (bedaŭre) - Ni ne plu parolu pri tio. Cetere, mi havas ion pli konvenan por proponi al vi. Jen... mi ligas ekstremon de tiu ŝnureto al via malsana dento kaj la alian ekstremon al la mantenilo de la pordo. Baldaŭ venos la servistino. Kiam ŝi malfermos la pordon, samtempe via dento forsaltos. Bonega ideo, ĉu ne?

K — Ho, ne tre alloga, laŭ mi!

D — Ĉu vi preferas la segilon?

K — Ne, ne! Se nepre necesas, mi preferas la ŝnureton.

K — Ne! ne! ne!... Ne eniru! Mi estas tute nuda! ( la paŝoj malproksimiĝas)

D — Ŝi timis. Ŝi foriris!

K — Uf!

D — Mi tuj malligos vin. Mi provos alian proceden. ( li malligas la viktimon).

K — Ho, dankon, sinjoro!... Nu... ĝis revido!

D — Sed mi ne eltiris vian denton!

K — Mi ne plu suferas! Tute ne!!

D — Ta.... ta...ta... Mi resanigos vin, malgraŭ vi. Mi proponas al vi mian plej sukcesan metodon: la eltiron per pistolo.!

K — Per pistolo?! Helpu! Helpu min!! (li forkuras, falas). Ne murdu min! Ne murdu min!

D — Kiu parolas pri murdo? Stariĝu! (li helpas lin). Mi deziras nur eltiri vian aĉan denton. Staru tie... ne tremante... Metu tiun teleron sub vian mentonon... Malfermu la buŝon... ege!... Ne plu moviĝu... Atentu: unu... du...

K — Atendu! Sed se vi sendos la kuglon en mian kapon!

D — Ne eblas! Ne eblas! Mi estis fama pafisto de cirko! Nu... ni rekomencu! Malfermu! Pli ege!...

Bone!... unu... du...

K — Munuton! Mi perdas mian pantalonon!

D — Vi estas neeltenebla! Bone staru! Atentu: unu... du... tri! (pafo!) Plenumita afero... Tio kostos kvincent frankojn. ( la kliento kraĉas denton en la teleron) Se vi deziras konservi viajn dentojn, vi rajtas anstataŭigi denton per blanka fazeolo.

K — Mirinda! Vere mirinda!... Multekosta sed mirinda! (turnita al la publiko) Se vi havas denton, kiu dolorigas vin, mi konsilas al vi kapti la okazon.

D — Jes! Tre volonte!... Je via dispono!

*Maksim SMAGIN* [Ekaterinburg, Rusio]



K — Aŭskultu min, sinjoro... ne hodiaŭ.. mi preferas morgaŭ... jes, morgaŭ... Mi promesas al vi...

D — Ne kondutu vin kiel infano, sinjoro.. Dank'al miaj procedoj, nenion vi sentos... preskaŭ nenion. Vi mem elektos la proceden... Kion proponi al vi?.. Ha! la tenajlo! ( li prenas ĝin kaj ĝin montras antaŭ la teruritaj okuloj de la kliento)... Kion vi opinias pri la tenajlo?

K — Ne... ne... ne la tenajlo!

D — Ha, finfine, vi estas saĝa. Cetere, vi ne bedaŭros, tio estas tre amuza!! ( Li ligas la klienton sur la seĝo kaj la denton ĉe la mantenilo). Ha!... Mi aŭdas paŝojn!

K — HA; ha... ( la paŝoj malproksimiĝas)

D — Tio ne estas por tiu ĉi fojo.. Ĉu vi ne trovas tre interesa tiun atendon?

K — Ne, tute ne! Malligu min! Mi ne plu volas!! (oni aŭdas paŝojn)

D — Tro malfrue. Jen estas ŝi.

# ANEKDOTOJ

**Viktor Alikin**, PERMO, Rusio

Edzo revenas hejmen post fiŝkaptado. Singarde frapas la pordon kaj demandas la edzinon:
— Ĉu la kato estas hejme?
— Eniru, eniru! Mi al ĝi jam sproton aĉetis.!

***

Sidas fiŝisto sur bordo de rivero. Finiĝis ĉe li vermoj. Li skribas sur paperpeco "Vermo", surmetas ĝin sur hoketon kaj ĵetas hoketon en akvon. Post iom da tempo eltiras ĝin kaj sur la hoketo vidas paperpecon. Sur la paperpeco estas skribita "Karaso".




**Bill Thorne,** [LONDONO, Britio]

**Helena Jakovleva**, ARĤAGELSKO, Rusio

Al la mastro de negranda cirko venas viro, delonge serĉanta laboron kaj demandas:
— Ĉu estas vakansio?
La mastro respondas:
— Mi bezonas la ŝnurpaŝiston, sed sciu , ke vi devas vesti kostumon de simio kaj iri super la abismo kun leonoj.
La viro ne povas diskuti kaj konsentas. Vestas la kostumon kaj paŝas per malgrandaj paŝoj sur la tirita ŝnurego. Sed perdas ekvilibron kaj falas sur la leonon.
— Helpu min, - kriis la viro, kiam la leono atakas lin. — Ĉi tiu besto min formanĝos!
— Silentu, — susuras la leono. — Ĉu vi volas, ke oni nin maldungu!

**Oleg Demjaŝev**, NABEREĴNIJE ĈELNI, Rusio
*El kartvela humuro*
Dum la akvopilka ludo kartvela sportisto Gógia kaptis pilkon kaj komencis naĝi al la pordegoj de la konkurantoj. De flanko aŭdiĝas ĝemkrio de la kartvela trejnisto:
— Gógia, ĵetu pilkon al Givi!
"Por kion ?" - pensas Gógia, rapide proksimiĝante al la pordegoj de konkurantoj.
Denove:
— Gógia, ĵetu pilkon al Givi!
"Ĉu la trejnisto stultiĝis?" - pensas Gógia, — "mi havas pli oportunan pozicion".
Fin-fine Gógia proksimiĝis al la pordeĝoj de konkurantoj kaj enbatas golon.
— Ĉu vi estas kontenta? — demandas li la trejniston, kiu sidas ĉe la rando de la baseno — mi ja faris golon!
— Por kion mi bezonas vian golon, - plore respondis la trejnisto. — Givi dronis.

# AFORISMOJ

Esperantigis **Martin Ginette**, SAULXURES SUR MOSELOTTE, Francio

***

Ĉiuj scias, ke tiu afero estis nefarebla. Venis stultulo, kiu ne sciis tion, kaj li sukcesis fari. (Marcel PAGNOL)

***

"Mi ne estas pli stulta, ol alia!" — "Kiu alia?" (CLEMENCEAU)

***

Mi volonte edziĝus kun malgranda virino, ĉar inter du malbonoj oni devas elekti la plej etan. (Jean COMMERSON)

Respondoj al la KONKURSO en "K-7'98" *Horizontale*: 1ŝtormvesto,2biskoto 3aero 4astro 5remilo 6kompaso 7lantemeto 8gamelo 9aŭroro. *Vertikale*: 1taso 2rojo 3vojo 4salo 5boato 6intertempo 7kulo 8tendaro 9vegetalo 10ondo 11itinero 12rano.

# KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 3 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn
Por pagintaj abonantoj de "K" - senpage

s-ino *Helena Jaroŝenko*
serĉas kor.tm., p.ĉ.t.por sia e-klubo "DANKO"
Molodeĵnaja, 9 - 6,
VOLGODONSK
347340
RUSIO

s-ro *Fred Neeme*
pri filatelo kaj turismo
Kooli 6-26,
EE.2240
KELVA
ESTONIO

s-ro *Zelmir Pehar*
29ja.,
turismo
14 Boronja ave.,
DANDENONG,
North 3175,
AŬSTRALIO

s-ro *Reni Tom Krupp-Lewanderski*,
28 ja.,ebleco de reciproka gastigado
117, rue Notr Dame des Champs,
PARIS,
FRANCIO

s-ro *Timofej Dmitrijeviĉ Ŝuvajev*
serĉas korespordantojn por sia E-klubo
60 let Oktjabrja, 6 - 135
NIĴNEVARTOVSK
626440
RUSIO

s-ino *Tatjana Kukuŝkina*
25 ja., kor. pri ĉiuj temoj tutmonde
Rusanova, 21 -36
PEĈORA,
Komia respub., 169700
RUSIO

f-ino *IrinaBorisova*
17ja., legi, piano, la franca lingvo
Jesenina, 11
TERBUNI
Lipeckaja ob., 399540
RUSIO

s-ro *Alcino Remos Alvez*
reciproka gastigado
Est Areies,
Bl. B-2-D,
S. PEDRO DO ESTORIAL
PORTUGALIO

s-ino *Oksana Kolesnikova*
27 ja., psikologio, amatora teatro, "ŝejping"
Ŝkolnaja, 6
CELINNOJE
Kurganskaja ob., 641150
RUSIO

s-ino *Nina Aleksandrovna Kononec*
50 ja., foto, vojaĝoj, muziko, sporto
Fabriĉnaja, 26-4
BIKIN,
Ĥabarovskij kr., 682980
RUSIO

s-ino *Maria Pentika*
turismo
Agui Meletiu 83,
GR - 11252
ATHINA
GREKIO

s-ro *Ivan Nikolov*
kun nefumantoj, eblas reciproka gastigado
ul. Aleko Konstantinov, 15, p.k. 3
BG - 5250, SVISTOV
BULGARIO

*Timur Ĥalilov*
12 ja., dancoj, ajkido, futbalo, lingvoj
p.k. 132
EKATERINBURG
620041
RUSIO

RONDO-KATO
(Esperantista Kat-Amikaro) ĉio pri katoj - bk, pm., ...
Linderbergsg. 4,
SE-85356
Sundsvall,
SVEDIO

s-ino *Bettina Radau*
35ja., lingvoj, vojaĝoj, sporto
Am Puttkamp 62,
DE-40629
DUSSELDORF
GERMANIO

s-ino *Mantha Christou*
ebleco de reciproka gastigado
Ethnikis Antistasseos 34
RAFINA
(Athina)
GREKIO

s-ro *Pascal Rouillard*
vegetarismo, ebleco de reciproka gastigado
35 rue Georges Bizet
FR-13200
ARLES
FRANCIO

s-ino *Marja Soininen*
42ja., ebleco de reciproka gastigado
Gunarintie 3,
FI - 72300
VERSANTO
FINNLANDO

KORESPONDI...listo de dezirantoj korespondi enhavas pli ol 45 adresojn Sendu vian anoncon por senpaga enpresigo; aldonu 2 Internaciajn Respondkuponojn, se vi deziras ekzempleron. Lastan eldonaĵon vi ricevos sendante unu IRK aŭ 10 adresojn de seriozaj esperantistaj korespondemuloj el diversaj landoj.
R.MELO, 34, Avenue de Russie, FR.03700
BELLERIVE S/Allier, FRANCIO

LERNU ESPERANTON — ABONU "KOMENCANTON" !
*KOMENCANTO*
daŭrigas sian abonkampanjon por la jaro 1999. Abontarifojn vidu sur la 2-a paĝo

